

LA

VERDA

STELO

ESPERANTO NEDERLAND
1905 - 2005

Juist nu!

100 jaar in gesprek
met de wereld

Esperanto
Nederland

sekcio
Groningen-Drente
aprilo 2005



eldono de Esperanto-klubo
GRONINGEN-DRENTE,
sekcio de
ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto :

s-ro J.S. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. 050 527 45 72

Sekretariejo:

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. 050 525 00 86

Kasisto:

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. 050 301 40 15



Kunvenejo:

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas de
la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro :

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J. Swenker, tel. 050 527 45 72

Redakcio:

Koos Scharroo,
Wil van Ganswijk-Vlasblom



Enhavo

Contributie afdeling Groningen-Drente

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 11,34
Gezinslid	€ 5,67
Doneur (minimaal)	€ 5,67
Abonnement LA VERDA STELO	€ 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v. afd. Groningen,
ESPERANTO NEDERLAND te Bedum

Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 25,00
Gezinslid	€ 7,50

Karaj legantoj!

Senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj!

Do, karaj membroj kaj abonantoj, zorgu, ke la kasisto ne estas senlabora tro longe. Ekzemple per pago de la kotizo aŭ abono por ĉi tiu jaro. Sur la interna flanko de la informila kovrilo vi trovos la necesajn informojn. Anticipe dankas vin la kasisto.

Ledigheid is des duivels oorkussen!

Dus beste mensen, zorg ervoor dat de penningmeester iets te doen heeft. Betaal bijvoorbeeld uw contributie of abonnement voor dit jaar. Voor in deze informilo vindt u alle noodzakelijke informatie.

De penningmeester dankt u bij voorbaat.

Naskiĝtagoj



APRILIO

1 T. Bulk-Beenen
6 P. van Kappen-vd Kamp
17 M.K. Heide

JUNIO

1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
24 J. Snoek

MAJO

7 G.C. Boer
11 J. Hennekam-Tijs
31 J.W. Moonen

JULIO

20 H. Smith

Gratulon!



Renkonti neformale unu la aliajn dum la somerperiodo vi povos:

- ★ la 7-an de julio en la *Scandinavisch Dorp*, Oude Badweg 1, Eelderwolde
- ★ la 11-an de agosto en la *Schimmelpenninckhuis*, Oosterstraat 53, Groningen.

Venu tien ĉirkaŭ la 10-a horo por kune trinki kafon!
Ĉiu estos bonvena, do ANKAŬ VI!

Klubvesperoj

APRILIO

28 Lingvoj / helplingvoj / novaj projektoj

MAJO

12 Hans Andersen – *vivo kaj fabeloj*

26 Ni kune manĝos - *en la picejo je la 7-a vespere:*
Il Lago, S.O.J. Palmelaan 305, Groningen

SEPTEMBRO

8 Rememoroj pri la somerferioj

22 La dua bendo de
Pasporto al la tuta mondo

OKTOBRO

6 Malferma Vespero (evt. gramatiko)

20 Ĉiu rakontu ion pri iu Esperanto-libro

NOVEMBRO

3 Esperanto-poemoj

17 Ni invitu *gastpreleganton*

DECEMBRO

1 Ludvespero

15 Zamenhof



Humuro



Pingveno eniras drinkejon.

- Donu al mi duoblan viskion.

La vendisto, embarasita, iras al sia ĉefo kaj rakontas la situacion. La ĉefo diras:


- Prenu de li 20 eŭrojn!

La vendisto tiel faris. La pingveno pagis kaj trankvile stariĝis apude, trinkante sian viskion. La vendisto, daŭre embarasita, sed scivola, tamen kuraĝis demandi:

- Fakte, ne ofte pingvenoj vizitas nian drinkejon!

La pingveno respondas:

- Ili tute ne vizitos vin, se vi pagigos ilin po 20 eŭroj por ĉiu duobla viskio.



Kio okazis en Groningen?


La 2-an de decembro 2004

Kelkaj el ni estis en Roterdamo pro la Malferma Tago de UEA. Luit ne povis eniri la saloneton kiam Marjorie Boulton prelegis, ĉar

jam estis tro da personoj en ĝi. Koos ja aŭdis ŝin, sed ne havis sidlokon kaj devis stari ĉe la enirejo.

En la librovendejo estis tiom da aĉetemuloj, ke oni enviciĝu por pagi la deziratajn librojn.

Wil tien kunportis du grandajn skatolojn kun la vestaĵoj de sia iama infangrupo: verdaj jupoj kaj ŝaloj, blankaj bluzoj kaj ŝtrumpetoj. Ili similas la lerneajn uniformojn de la lernantoj en Lomeo en la nova lernejo *Zamenhof* en Togolando. Iu



belgo transportis poste la skatolojn al Belgio, de kie ili meze de decembro kun aliaj donacoj estis transportitaj per kontenero al Togolando. Kiel finanĉan helpon al la transportkostoj Wil provis kolekti monon per la vendado de la plastikaj kapuĉmanteloj, kiujn ŝi ne forsendis tial, ke ili ne estas uzablaj en tre varma klimato.

Johan raportis pri la informtago de AEGEE (*Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe*), dum kiu li prelegis en la angla pri Esperanto dum unu kaj duona horoj. Jam en la printempo nia klubo estis petita tion fari. Ĉeestis pli ol 30 junaj studentoj de 19- ĝis 25-jaraĝaj. Estis sufiĉe da intereso.

Fieke raportis pri sia Esperanto-kurso, kiun sekvas 6 personoj. Luit jam estis alparolita en Esperanto de unu el ili, kiu estas koleginino de li.

Kun bukedado kaj libro pri Andreo Cseh la tri estraranoj vizitis Petra kaj Henk van Kappen por danki ilin pro la laboro dum multaj jaroj rilate *La Verdajn Stelojn*. Estis agrabla vizito!

Dennis van der Heijden rakontis nin pri sia restado en Ganao dum la du antaŭaj jaroj.

Li komencis studi Esperanton antaŭ nur ses semajnoj kaj kapablas prelegi en Esperanto jam

nun!

Li laboris du jarojn en tiu lando, kiu situas okcidente en Afriko. Li tie instruis en mezlernejo la anglan, matematikon kaj sporton. En februaro 2005 li iros al Ugando dum dek tri monatoj por trejni sportinstruantojn.

En Ganao, najbara lando de Togolando, oni parolas 45 diversajn lingvojn, kiuj estas tonlingvoj. La plej ofte parolata estas la lingvo *Eve*, kiun Dennis kapablas paroli. La oficiala lingvo de Ganao estas la angla, sed ne multaj gelernantoj parolas ĝin flue. Tamen ili estas ekzamenataj en la angla.

Ganao estas 6-foje pli granda ol Nederlando kaj havas 19 milionojn da enloĝantoj. La koloroj de la flago de Ganao estas ruĝa, pro la sango de multaj, kiuj mortis je la liberigo de la lando en 1957, flava pro tio, ke la antaŭa nomo de la lando estis *Ora Bordo*, verda pro la multaj arbaroj, kaj nigra stelo en la mezo, kiu simbolas la afrikan liberecon.

Pro tio, ke la knabinoj ĝenerale estas tre timidaj, tre taŭga ludo por ili estas korbopilko, kiun la geknaboj ludas kune.

Dum lia restado en Ganao vizitis la lernejon tri ministroj por vidi, i.a. la rezultojn, kiujn li akiris per sia instrumetodo. La ganaaj instruistoj elektas sian profesion pro la mono, kiun ili ricevas dum la studado, sed fakte ili tute ne ŝatas instrui nek amas infanojn.

La manĝaĵo grandparte konsistas el *fu-fu*. Virinoj kaj infanoj manĝas kune, la viroj aparte.

Kiam Dennis reiros al Afriko, li vizitos ne nur denove Ganaon dum kelkaj semajnoj, sed eble ankaŭ Togolandon por vidi tie la lernejon *Zamenhof* en Lomeo. Post sia studo de Esperanto ĉi tie li studu la lingvon svahilan, kiun oni parolas en Ugando.

Li certe sukcesos, ĉar lia kapablo prelegi en Esperanto post tiom malmultaj semajnoj estas mirinda! Li havas TTT-paĝon:

www.geocities.com/dennisvanderheijden.

Koos kunportis gazetartikolon pri la ĉina lingvo,

kiu fakte ne estas ununura. En Ĉinio estas parolataj sep diversaj lingvoj, el kiuj la mandareno estas la plej multe uzata. Li voĉlegis la artikolon en Esperanto. Se vi scivolas pri la enhavo de la artikolo, petu de li kopion.

La 16-an de decembro 2004, festa kunveno En 2004 ni ne organizis *Zamenhof*-tagon, ĉar ja estis Esperanto-tago en la somero. Kion do fari dum la kunveno je la 16-a? Ni preparis festan kunvenon por rememorigi la naskiĝdaton de Zamenhof. Ni kune verpermanĝetis. Johan hejme vespermanĝis, sed tamen estis sufiĉe da spaco en la stomako por la manĝaĵoj, kiujn preparis Wil van Ganswijk. Komence estis kuirbanita pano, nomata en la nederlanda lingvo *pofferd* aŭ *broeder*. Dum la paŭzo oni manĝis saltmiksaĵon kun pano kaj legomoj ktp. Tuj antaŭ ol iri hejmen, oni ankoraŭ manĝis mandariinojn. Estis do vespero bongusta.

Vi ja scias, ke Wil gvidas kurson je Interreto. Tiel ni akiras novajn membrojn el la ĉirkaŭaĵo de Groningen. Unu el ili loĝas eĉ en Francio. Tiu nederlanddevena francino faras gratulkartojn ŝatokupe. Pri la jaro 2005 ŝi faris belan Esperanto-kalendaron. Wil ricevis ekzempleron kaj entuziasme montris ĝin.

Ĉiu preparis ion rilate Zamenhof, ekzemple poemo, historieto, festparolado aŭ io alia. Ni do aŭdis la poemon *Pluvo*, rakontojn pri liaj lastaj tagoj kaj la voĉon de Zamenhof mem.

Fieke van der Veen kaj Wim Rijnders anoncis, ke ili preparis ion kune. Sed antaŭ ol ili tion aŭdigis, Dennis van der Heijden voĉlegis du leterojn de Zamenhof pri *homaranismo*.

Poste Fieke do kantis kaj Wim akompanis ŝin gitate. Fieke surprizis nin: ŝi havas altan, laŭtan kaj trejnitan voĉon!

La 6-an de januaro 2005

Dum la unua kunveno de la jaro Wil van Ganswijk entuziasme rakontis pri siaj kontaktoj kun alilandanoj aŭ kun samlandanoj en aliaj landoj, ekzemple Tajlando, de kie ŝi ricevis karton. Nia membrino en Francio sendis belan karton memfaritan kaj ŝian belan kalendaron

Wil vendis al Johan. Novjarsalutis nin *Riet Heide* kaj la esperantistoj de *Murmansko* kaj de *Nimego*.

Forpasis la 18-an de decembro la iama membro *Karel Wever*.

Koos malnete tradukis franclingvan broŝuron pri Esperanto en la nederlandan: *Esperanto-zó-op-zak*. Bona ideo, bona teksto, kiun tralegos Wil, Johan kaj Ineke. Kion ni faru poste per la teksto? Eble *Esperanto Nederland* interesiĝos pri ĝi.



la broŝuro

Dennis van der Heijden baldaŭ vojaĝos al Ugando, kie li laboros dum 13 monatoj kiel sportinstruisto, pro kio oni ofertis al li 3 librojn, el kiuj li elektu unu. Li elektis la libron *Pipi Ŝtrumpolonga*. Ni ĉiuj deziras al li bonan restadon en Afriko!

Pro la naskiĝtago de Wil kantis por ŝi Wim Rijnders, kaj ŝi regalis nin per *Crème der Aa*, bona memfarita kuko.

La temo estis *poemoj*. Wim prezentis poemon de *Marjorie Boulton*, kiun li trovis en malnova eldono de *Fenikso* (1994).

Luit laŭtlegis unu tekston el la kantoj de la nova kompakta disko de *Kajto: La Malluma Vagono*, kiu estas pli serioza ol Kajto kutimas. Li prezentis ankaŭ gajan tekston de *Raymond Schwartz*. Dennis rakontis, ke li loĝas en *Beijum* kaj tie pli-malpli hazarde vizitis sian elementan lernejon *Dom Helder Camara*. La lernejestro estis tiel entuziama pri liaj aktivecoj en Afriko, ke li dediĉis al ili specialan projekton. La lerneĵanoj verkis

poemojn. Unu el ili nomis Dennis *heroo*. Wil trovis en la poemaro *Poezia Bukedo* de *Bertram Potts* la poemon *neĝhomo*.

Ni finis la oficialan parton ĝustatempe, sed, kiel nuntempe ofte okazas, restis multaj, ankoraŭ babilante pri estontaj planoj kaj vojaĝoj.

La 20-an de januaro 2005

Ne nur ĉeestis la kutimaj membroj, sed ankaŭ gesinjoroj *Nassenstein* el Francio.

S-ino Nassenstein estas lernantino de Wil van Ganswijk. La geedzoj estas dum kelka tempo en Nederlando kaj decidis viziti ankaŭ nian klubon. Ili estas nederlandanoj, kiuj post multjara restado eksterlande eble revenos Nederlandon. Ankaŭ ĉeestis s-roj *Molthoop* kaj *van der Heij*, kiuj pro diversaj kialoj dum longa tempo ne povis viziti la kunvenojn de nia klubo.

Unue s-ino Nassenstein parolis pri la vivoj de si kaj de sia edzo. Estis la unua fojo, ke ŝi parolas Esperante. Ŝi lernis la prononcadon, aŭskultante kantojn kaj samtempe legante la tekstojn. Ŝi montris kelkajn fotojn de ilia domo en la regiono de Ardèche. Poste la aliaj ĉeestantoj prezentis sin al niaj gastoj.

Survoje al Nederlando ges-oj Nassenstein vizitis ŝian belgan korespondamikon. Ankaŭ tiu belgo estas interretkursano de Wil.

Kelkajn interesajn travivaĵojn, kiuj okazis antaŭ multaj jaroj rakontis s-ro van der Heij. Li profesie instruis al surdaj gelernantoj kaj pro tio scias ankaŭ pri gestlingvoj. Ĉu vi sciis, ke estas diferenco inter la gestlingvoj de usonanoj kaj nederlandanoj? La usonanoj uzas ambaŭ manojn dum la parolado kaj la nederlandanoj nur unu. La alian manon oni bezonas por teni la biciklan stirilon! Iam li ĉeestis ankaŭ konversacion inter diversnaciaj surduloj. Sperta gestlingvisto montriĝis bona interpretisto inter la 'parolantoj' de la diversaj gestlingvoj.

S-ro Molthoop kunportis interalie faldfolion pri *Klavaraskribo*. Multaj homoj scias pri la kutima muzikskribo (kun notoj sur la notliniaro). Klavaraskribo (Esperanta traduko de *klavierschrift*) estas alia muzikskribo. La nederlandano *Cor Pot*

estis de tiu muzikskribo la eltrovinto.

Kvankam estas sur la tagordo *ludoj*, ni fakte nur babilis, en bona harmonio kaj ne nur *en*, sed ankaŭ *pri* Esperanto. S-ro Nassenstein ne estas esperantisto, kaj interalie pro tio ni regule uzis ankaŭ la gepatran lingvon.

La 3-an de februaro 2005

Okazis nia jarkunveno. Kiel ĉiam, ĝi estis ankaŭ normala klubkunveno, kio signifas, ke ni multe babilis. Eĉ tiom, ke la malfermo de la jarkunveno okazis duonan horon post tiu de la kunveno mem.

Sciindaĵoj estis, ke la kotizo restas 11,34 eŭroj, kaj ke Koos Scharroo kaj Wim Rijnders estas en la kaskontrolkomisiono de la nuna jaro. Ineke Emmelkamp denove estas anstataŭanto, pri kio ŝi spertas.

Ĉiuj ĉeestantoj estas aŭ estrarano aŭ membro de la kaskontrolkomisiono. Iu rimarkis, ke tio do signifas, ke li ne povas fariĝi estrarano. Ĉu la sekvan jaron ni komencu la jarkunvenon per la elektado de nova estraro?

Kiel ĉiun jaron ni petegis de la ĉeestantoj fariĝi estrarano. Ĉi-jare neforte malakceptis Wim, indikante, ke li opinias sin nespertulo. Ĉu tio signifas, ke li ja akceptos la sekvan jaron?

Wil van Ganswijk menciis, ke pro ŝia aĝo iam ĉesos ŝia laboro por la klubo. Nia 'sperta anstataŭanto' diris, ke tiam ŝi anstataŭos Wil. Kvankam la estraro ne do ŝanĝiĝis, estas klare, ke tio ne kaŭzos problemojn al la klubo.

La ceteron vi legos iam en la oficiala raporto pri la jarkunveno.

La 17-an de februaro 2005

La temo estis *Claude Piron*, sed unue pri la kutima rondvojaĝo tra Esperantujo: Koos partoprenis studosemajnfinon en Vierhouten kaj transdonis al la groningena klubo la salutojn de *Rob Moerbeek*, kiu estis unu el la gvidantoj. Sabaton ĉeestis ankaŭ Douwe, kiu estas lernanto de Fieke. Entute ĉeestis proksimume 30 personoj, inter ili estis kelkaj eksterlandanoj (i.a. usonano).

Vendredon vespere oni prezentis filmon en Es-

peranto: *Inkubo* (kio signifas *nachtduivel*). Sabaton vespere estis festvespero pro *100 jaroj de Esperanto en Nederlando*. Oni ludis esperantigitan *anserludon*. (Belega torto kun verda stelo ornamita per granda nombro *100* estis la premio por la gajninto.)

Kiel kutime estis grupoj por diversaj niveloj. La grupojn gvidis respektive *Rob Moerbeek*, *Bert de Wit* kaj *Sophia Mensen*.

Verkis artikolon pri Esperanto kaj pri la studosemajnfino ĵurnalisto de la *Twents Dagblad*. Pro tio li intervjuis *Marijke Lathouwers* kaj *Jordi Haarman*.

Koos iomete rearanĝis la informilon, kiun li kompilis surbaze de franca originalo. Li interalie aldonis ruĝan tulipon (la simbolo de 100 jaroj de Esp-o en Nederlando). La faldfolio estos prezentita ankaŭ en la retpaĝaro de la franca organizo, de kiu venas la originala versio.

En *www.lernu.net*, kiu estas senpaga multlingva TTT-paĝo pri Esperanto kaj por konatiĝi kun la Internacia Lingvo kaj por lerni ĝin, Koos helpis subtitoli filmajn intervjuojn.

Wil ricevis de la Esperanto-grupo *Subvisurgo* (Unterweser) retmesaĝon, kiu estas invito pro la klubo veni la 4-an de junio al kunveno en *Rodenkirchen*, Germanio. Unterweser estas regiono norde de Bremeno.

Sinjoro, kiun Wil renkontis, petis de ŝi informojn pri Esperanto kaj pri *Bellevue*. Li trovis tiun nomon en studolibro de sia patro. Neniu el ni scias ion pri Bellevue.

Ni ĉiuj (escepte de Wiebren, kiu eraris pri la dato) kunportis librojn de aŭ informojn pri *Claude Piron*. La fonto, de kie ni ĉerpis la informojn, estis Interreto.

Claude Piron verkis plurajn diversstilajn kaj –temajn librojn kaj ne nur sub sia vera nomo. En la faldfolio *Ĉu babilona konfuzo?* li kritikis la uzeblecon de la angla lingvo por internaciaj renkontiĝoj. Ni alterne laŭtleĝis parton de la teksto.

La 18-an de marto 2005

Wil disdonis po du invitojn al la klubanoj, nome:

1. Invito por la festaranĝo pro la 100-jara jubileo de Esperanto en Nederlando, kiu okazos la 7-an de majo en *Egmond ĉe maro* kaj la 8-an de majo en *Heerhugowaard*. Oni krome festos kaj la jubileon de la unua UK en Bulonjo ĉe maro (Francio) kaj la Faulhabersemajnfino.

2. Invito de la grupo *Unterweser* partopreni en la festaĵoj pro la dekjara ekzisto de tiu klubo. Wil petis konsideri la partoprenon kaj komuniki kiel eble plej baldaŭ ĉies decidon.

Johano ricevis peton de iu traduki jenan frazon en Esperanton:

De wereld is mijn vaderland. Nationale bekrompenheid, voorliefde en vooroordelen zijn mij vreemd.

La frazo estis tiel malfacila, ke por traduki ĝin eĉ Johano bezonis vortaron. Kiam li indikis al la petinto, ke eblas fari retan kurson, tiu respondis, ke li ne povas, ĉar li restadas en la *Mesdag-kliniko*. Ne tute malliberigita, sed tamen limigita je libereco. Johano sendos al li la unuajn lecionojn de la Esperanto-kurso de Wil per paperpoŝto.

Luit kontribuis al Esperanto-libro, en kiu multaj esperantistoj el diversaj landoj verkis proprajn Esperantajn spertojn. La editoro sendis al li peton proponi korektontojn. Neniu el la ĉeestantoj kredis sin kapabla. Wil proponis transsendi la peton al Rob Moerbeek, kiu ege amas la korektadon kaj ofte korektas eĉ nepetite.

Johano komunikis, ke Fieke deĵoros la 5-an de majo en Esperanto-budo en la urboparko en Groningen dum la festaĵoj pro Liberiĝtago. Ŝi petis de ni helpon en la budo. Johano tuj respondis: "Jes, kompreneble!". Ankaŭ aliaj intencas helpi ŝin.

Johano prelegis pri *atestoj*, pro kio li disdonis memfaritan informilon, kiu enhavas klarajn kaj fundajn faktojn pri atestoj. Atestoj ĉefe celas:

1. Subskribi retpoŝton por pruvi la identecon de la sendinto

2. pruvi, ke la poŝtenhavo ne ŝanĝiĝis dum la sendado
3. ĉifri la enhavon de retroŝto por fari ĝin nelegebla al nekonatoj
4. por sin legitimi ĉe retejoj kaj inverse: la retejoj povas legitimi sin ĉe vi.

Atesto similas pasporton, sed kial vere kontroli la identecon? Johano priskribis ruzan sistemon de sia atest-eldonanto, *Thawte Consulting*, kiu nomiĝas *Reto de Fido*. Laŭ tiu sistemo fidindaj personoj kontrolas novajn atestantojn kaj per persona rekontiĝo kaj per kontrolo de iliaj normalaj pasportoj. Post sukcesa kontrolo oni ricevas poentojn. Kiam oni atingas sufiĉe da poentoj (35), ties nomo estas montrata en la atestaj informoj. Se oni havas la maksimuman kvanton de 100 poentoj, oni mem rajtas kontroli aliajn. Johano atingis la maksimuman kvanton, sed ĝis nun kontrolis nur 6 personojn.

La 31-an de marto 2005

La kunvenon ĉeestis 12 personoj. Ni invitis por tiu vespero preleganton, nome *Ziko Sikosek*, germana esperantisto, laboranta ĉe UEA en Roterdamo.

La temo de lia prelego estis *Universalaj Kongresoj, rerigardo kun rideto al mirindaĵoj*.




Ziko Marcus Sikosek

Li pritraktis la temon laŭ la enhavo de la ĵus de li verkita libro kun la titolo *Sed homoj kun homoj*. Fotojn el la libro kaj aliajn li montris al ni per sia komputilo. La libro enhavas 90 ĉapitrojn pro tio, ke okazis 90 Universalaj Kongresoj, el kiuj li priskribis sciindaĵojn. Tre klare Ziko rakontis pri

la organizado, pri la organizantoj kaj pri la partoprenantoj de la kongresoj. En la Universalaj Kongresoj, laŭ Zamenhof, ne kunvenas francoj kun angloj aŭ rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. El tiu diraĵo Ziko prenis la titolon de sia libro.

Post la prelego de Ziko estis ebleco fari demandojn, kiujn li bone sciis respondi. Eblis ankaŭ aĉeti la libron, kiu cetere estos aĉetebla ĉe UEA en Roterdamo. La prezo de la libro estas 30 eŭroj.



Sed homoj kun homoj

Komence de la vespero Ineke Emmelkamp informis nin pri la semajnfino en *Egmond aan Zee*. Ŝi montris poŝtmarkojn kun la emblemo de tiu semajnfino.

Ni aŭdis, ke naskiĝis bebo ĉe *Joost Witteveen* kaj ĉe lia edzino *Iliana*, kiuj iam deĵoris en Esperanto-budo dum nia Zamenhof-tago.

Johan Dercks dankis skribe pro nia gratulo okaze de sia edziĝo.

La uniformoj, kiujn Wil sendis al Togolando, alvenis tie bonorde. Ŝi forsendis ankaŭ la monon, kiun ŝi ricevis pro la vendado de la kapuĉmanteletoj.

Estis tortetoj de amikino de Wil, kies edzo festis sian naskiĝdatrevenon kaj estis mendinta tro multe da tortetoj. Al ni tio tre plaĉis!



Memoraĵon pro la fakto, ke ŝi jam pli ol 50 jaroj estas ano de Esperanto-unuiĝo, ricevis *Lies Broekema-Clemens Schröner*. Spontanee ŝi rakontis kiel ŝi iam fariĝis esperantistino.

La 14-an de aprilo 2005

Reagis 8 personoj al la invito de la Esperanto-grupo *Subvisurgo* (Unterweser) viziti Rodenkirchen por festi ĝian dekjaran jubileon. Ni do povos iri per 2 aŭtoj. Tri membroj de la klubo intencas partopreni la Esperanto-semajnfinojn en Egmond ĉe maro kaj Heerhugowaard, kiu samtempe estas Faulhaber-semajnfino.

Pri la ĉi-jara Zamenhof-tago Wil konsiliĝos kun germanaj esperantistoj festi ĝin en Oldenburg, kie dum tiu periodo estos kristnaska foiro kun multaj budoj.

La temo estis *enigmoj*. Nur Luit kaj Wil preparis sin, kvankam Luit, supozante, ke tiun temon ni pritraktos la sekvan fojon, ne kunportis siajn

enigmojn. Sed kelktempa ĉeso ne estas forgeso. Solvendaj estis du enigmoj: el 25 silaboj oni formu 12 vortojn, de kies unuaj kaj lastaj literoj legitaj de supre malsupren, estas la komenco de Esperanta kanto. Kvankam jam baldaŭ montriĝis, ke temas pri la fama himno, ne estis facile kombini la silabojn por akiri la ĝustajn vortojn. La dua enigmo fakte estis ekzamena tasko: sen-vortare traduki vortojn kaj esprimojn kiel eble plej multe. Unu el la esprimoj tekstis *por ĉiu plezuro devas esti mezuro*, kio signifas ankaŭ, ke la prezidanto je la kutima horo fermis la kunvenon.

Kiel fartas la interreta Esperanto-kurso, kiun gvidas Wil?

En decembro 1997 Wil metis la unuan lecionon de la iama arnhema kurso sur sian hejmpaĝon. Nun post iom pli ol sep jaroj montriĝas, ke 371 personoj sendis al ŝi la tradukojn de la unua leciono. El tiuj 371 finis la kurson 64 kun bona rezulto. 118 aliaj sendis nur la unuan aŭ la unuan kaj duan lecionojn kaj ne pli. La aliaj estas aŭ restas survoje. El ili estas 15 nuntempe aktivaj. La plej nova kursano estas 11-jara knabo, la plej juna kursano ĝis nun. Ĉu

entute bona rezulto aŭ ne? Juĝu mem! En 2000 Wil instalas dissendo-liston por siaj kursanoj kaj aliaj interesiĝantoj. La nomoj sur tiu listo kreskis ĝis 190 partoprenantoj. Ne estas ĉiam la samaj, kiuj partoprenas. Foriras personoj kaj aliĝas aliaj, do la kresko estas nekonstanta, sed feliĉe tamen daŭra dum la pasintaj jaroj. La interretadreso de la kurso estas: <http://esperanto-cursus.tk>

Klavarskribo – kio estas tio?

Klavo = toets, ar = verzameling, skribo = schrift. Esperantistoj tuj do scias la signifon de la vorto, eĉ se ili antaŭe neniam aŭdis pri tia sistemo de muzikskribo.

Jam en la mezepoko (ĉ. 1200) oni uzis liniojn por noti muzikon. Tiam oni uzis 4 horizontalajn liniojn, ĉar estis nur sep notoj: *ut (do), re, mi, fa, sol (so), la* kaj *ti*. Oni rimarkis, ke la intervaloj aŭ distancoj inter la tonoj ne estas egalaj. Tiu inter *do* kaj *re* estas pli granda ol tiu inter *mi* kaj *fa*.

Poste oni ekuzis 5

liniojn por la muzikskribo kaj oni nomis la tonojn:

c, d, e, f, g, a kaj *b*, kiuj ricevis ĉiuj sian lokon sur unu el la linioj aŭ inter du linioj.

La distancon inter *c* kaj *d* oni nomis tuta distanco aŭ *duto*, tiun inter *e* kaj *f* duona distanco aŭ *duonduto*.

Per la signoj *bemolo* kaj *dieso* oni povas ŝanĝi la



distancon inter du tonoj.

S-ro Cornelis Pot (1885-1977) opiniis tiun sistemon tro malfacila kaj eltrovis novan. Li uzis por sia sistemo vertikalajn liniojn, en kiuj oni povas rekoni la klavaron de la piano. La linioj figuras la nigrajn klavojn. Punktojn li metis tien, kie oni

puŝu klavon. La streketoj de la blankaj klavoj estas meta-taj *super* la punkton. Tiuj de la nigraj klavoj *sub* la punkton. Tial ne estas bezonate uzi bemolojn kaj diesojn.

Same kiel en la alia notado oni povas vidi kiom longe oni devas puŝi la klavon.

La direkto de la streketo, kiu estas ligita al la punkto, montras ĉu oni uzu la dekstran aŭ la maldekstran manon. Oni legu la notojn de supre malsupren kaj tuj povas vidi kiujn klavojn oni puŝu. Pro tio estas homoj, kiuj pli ŝatas ĉi tiun sistemon ol la plej ofte uzatan. Provu mem! *sendis Harry Molthoop*



La lingvomaŝino.

verkis J.S. Veen

Sinjoro Hakma, mezaĝa nederlandano, ŝparis en kelkaj jaroj iom grandan sumon, kiun li uzis por efektiviĝi sian multjaran revon fari grandan vojaĝon al tre malproksima lando. Kun sia edzino li aviadile flugis al Japanio kaj tie restadis ĉirkaŭ kvin semajnojn. Li havis multe por rakonti, kiam li post la libertempo en la forlando revenis en sian ĉiutagan rutinon kiel kontoristo. Tamen li havis ankaŭ ion por montri al la kolegoj.

„Jen tute nova invento,” sinjoro Hakma diris kaj li prenis el sia teko objekton. Ĝi aspektis kiel longforma plata skatolo.

„Ĝi iom similas magnetofonon,” diris kolego, „sed mi vidas nenian lokon por enmeti bobenon aŭ kasedon.”

„Ĉi tio estas io alia,” parolis sinjoro Hakma, „lo, kion vi ankoraŭ neniam vidis. Atentu.”

Li manipulis stangeton sur la aparato. „Klik,” sonis kaj elstariĝis malgranda pokalo, kiu laŭ formo similis al la finaĵo de trumpeto.

Sinjoro Hakma nun premis butonon. „Klik,” de nove sonis kaj alia pokalo elstariĝis, duone granda kiel la alia. Montriĝis, ke la malgranda estas deprenebla de la aparato, al kiu ĝi restas tamen ligata per ŝnuro. La pokaloj aperis ne el

unu flanko de la aparato, sed el la du malgrandaj vertikalaj flankoj, starantaj unu kontraŭ la alia.

„Aŭdu,” diris sinjoro Hakma. Li tenis la malgrandan pokalon antaŭ la buŝo kaj flustris nekomprenoblajn sonojn. El la granda pokalo laŭte sonis monotona voĉo. La kolegoj aŭdis en sia propra nederlanda lingvo:

„Bonan matenon. Mi parolas al vi per la lingvomaŝino. Per ĉi tiu mi povas paroli en dekdu diversaj lingvoj, kvankam mi scipovas ne ĉiun el ĉi tiuj. La maŝino aŭtomate tradukas per la lingvoj: angla, araba, ĉina, franca, germana, hispana, itala japana, nederlanda, pola, portugala kaj rusa.”

„Tradukmaŝino,” ekkriis unu el la kolegoj, „Tio estas interesa objekto. Ion tian mi vere neniam vidis. Traduko en dekdu lingvoj! Ne bagatelo!” „En mia manĝejo laboras arabo,” diris la plej juna kolego, „Ni voku lin kaj vidu, ĉu li povas kompreni.”

Baldaŭ la arabo venis en oficejan salonon. Iom sinĝena rideto kovris lian vizaĝon; li ankoraŭ ne bone parolis la nederlandan.

„Mi ŝaltas la maŝinon je la araba,” diris sinjoro Hakma. Li flustris refoje la nekomprenoblajn sonojn kaj laŭte sonis parolado el la granda pokalo. Nun la nederlandaj kolegoj komprenis nenion. La arabo tamen ankaŭ ne montris signon de kompreno. Tre mirigite li rigardis al sinjoro Hakma kun lia aparato.

„Ho, pardonu,” diris sinjoro Hakma, „Mi erare ŝaltis la portugalan.”

Li korektis la eraran ŝalton kaj denove ekflustris. Tuj de kompreno ekbriletis la vizaĝo de la arabo. Lia amata gepatra lingvo estas uzata en moderna teknikaĵo. Ĉi tio tre ĝojigis lin kaj karestone li al si mem ripetadis la sonojn: „Belameĥanisma... belameĥanisma...”

Tiu maŝino estas miraklo,” rimarkigis la ĉeflibrotenisto, „Tio estas inventaĵo mondsdua. Per

ĝi malaperos ĉiuj ĝenoj pro multlingveco. Kion vi flustris en la aparaton? Ĉu ĝi estas iu kodo per kiu vi ordonas al la aparato?”

„Jes,” respondis sinjoro Hakma, „Estus facile, se oni povus flustri en la maŝinon per ĉiu el la dekdu lingvoj. Tute simple mi flustre parolus la nederlandan. La fabrikanto komence celis al io


tia. Dum provoj antaŭ la fabrikado montriĝis, ke la idiotismoj malebligas la aŭtomatan tradukadon. Idiotismo estas nombro da vortoj, kiuj esprimas kiel tuto specialan nocion. La samaj vortoj sinsekve komprenataj laŭ sia propra senco prezentas tute alian nocion. Ekzemple en nia lingvo „Kio estas al la mano?”

signifas „Kio estas la afero?” „Li bone estas sur la altaĵo de tio” signifas „Li multe scias pri tio”. „Krom la idiotismoj,” aldonis la korespondisto, „Ekzistas alia malfacilaĵo, nome la homonimoj.” La korespondisto estis persono, kiu emis ŝajnjigian scion pli vasta al ĝi reale estis. La truojn en sia scio li simple plenigis per fantaziaĵoj. Tamen li validis en la malgranda ofejeja societo kiel lingvisto. Li ja korespondis krom nederlande ankaŭ angle kaj germane.

„Homonimoj,” daŭrigis la korespondisto, „Tio estas unu sama vorto kun du aŭ pluraj signifoj tre diferencaj. Ekzemple en nia lingvo „bord” signifas jen teleron jen tabulon. Kaj „glas” jen glason jen vitron. Cetere precipe en la angla abundas homonimoj. Ni prenu la anglan vorton „matter”, kiu signifas aferon, materion, manuskripton, dokumentojn kaj puson. Laŭ kiu signifo la aparato traduku? Jen problemo simila al tiu de la kvadrato de la cirklo!

Oni povus sin helpi per afiksoj. „Matter-tja” por afero, „matter-tji” por manuskripto, ktp...

Komprenoble la aparato devus esti programita laŭ tia sistemo kaj la alflustranto devus ellerni kiun afikson li ĝustaloke uzu. Tre komplike! Mi supozas, ke vi flustras al la maŝino tute pretajn



frazojn, lernintajn el libro, kiu apartenas al la maŝino. Tio estas laŭkompare simpla solvo, sed tiel libera parolado ne estas ebla.”

„Ne,” diris sinjoro Hakma, „Mi ne uzas fiksitajn frazojn. Tion oni trovas en fremdlingvaj frazolibretoj por turistoj. Ne, mia maŝino funkcias ne laŭ ĉi tiu principo limiga. Mi ankaŭ ne bezonas aldoni klarigajn vortetojn. Montriĝis, ke oni tre malfacile lernas lardi sian paroladon per tiaj aldonoj. Pli oportune estas lerni la specialan maŝinlingvon. Ĝi estas facile lernebla kaj en ĝi mankas la ĝenaj elementoj, pri kiuj vi ĵus parolis.”

„Nu, klara maŝinlingvo facile lernebla ŝajnas al mi taŭga rimedo por solvi la problemojn,” diris la korespondisto.

„La aparato konsternos mian bofraton,” ridetante diris sinjoro Hakma, „Li sin okupas pri tiel nomata mondlingvo. Ĝi nomiĝas Eksterrampo... stelrompanto... aŭ io tia. La tre malmultaj parolantoj de ĉi tiu lingvo fakte formas sekton. La ĉefa punkto en ilia kredo estas, ke iam okazos miraklo, nome enkonduko de ilia lingvo en ĉiuj lernejoj fare de la ŝtatestroj en la tuta mondo.”

„Rilate la nomon vi eraras,” rimarkigis la korespondisto, „Fine de la pasinta jarcento ĉi tiun lingvon inventis la sveda inĝeniero Vahlenson. Je la fino de sia vivo li vagis en Parizo kiel almozpetanto. La korekta nomo de la lingvo cetere estas Aspirinto. Vahlenson elektis la nomon, pensante pri la germana medicinaĵo Aspirino. Tiam nova kaj tre konata forpelanto de doloroj. Lia lingvo forpelos la lingvomalfacilaĵojn. Do Vahlenson opiniis la nomon Aspirinto tre taŭga.”

„Kiom bone vi scias tion,” diris la tajpistino, „Mi neniam aŭdis pri tio. Nur en krucvortenigmoj mi kelkfoje renkontis la vorton Ido. Ĝi ankaŭ koncernas mondlingvon, ĉu ne?”

Kun sia kutima aplombo la „lingvisto” respondis: „Tio signifas Internacian Duan Onilingvon; fakte ĝi estas reformita Aspirinto.”

„Mia bofrato certe estos ŝokata, kiam mi prezentos al li la maŝinlingvon,” parolis sinjoro

Hakma, „Nun li devos konscii, ke lia Aspirinto ne plu havas ian perspektivon. Post kvin jaroj milionoj da tradukmaŝinoj estos uzataj kaj tiam kompreneble neniu eklernos ankoraŭ Aspirinton. Cetere mi vizitos la bofraton nur fine de la aŭtuno. Li loĝas malproksime en la nordo je distanco de tri horoj per aŭtomobilo.

Sinjoro Hakma vere amis la tradukmaŝinon. Hejme li tutajn vesperojn studis ĝian lingvon.

Rapide li progresis. Post kelkaj semajnoj li sentis sin kapabla por provo. Kun sia edzino li iris manĝi en itala restoracio. En Nederlando la tuta mondo de manĝado estas reprezentata, precipe ĉinaj kaj italaj restoracioj estas troveblaj multloke. La italaj kelneroj bone komprenis la tradukaĵojn de la aparato. Provo en ĉina restoracio montriĝis ankaŭ sukceso. Tamen en najbara vilaĝo en araba nokta amuzejo ĝi ne sukcesis. La amuzejo montriĝis pure nederlanda. Eĉ la ventrodancistinoj estis tiaj.

Ĉiam sinjoro Hakma kunportis la aparaton al la oficejo. Li faris gajigajn babilojn al la araba kolego, kiam ĉi tiu enportis la kafon matene. Sinjoro Hakma plektis en sia babilado kelkminutajn lecionetojn pri la nederlanda lingvo. Ankaŭ dum la tetrinkado posttagmeze sonis araba konversacio en la oficeja ĉambro.

En Nederlando vivas multaj eksterlandanoj. Ofte Sinjoro Hakma havis la eblon provi sian maŝinon. Ĉiufoje sin prezentis el la ĉirkaŭstarantoj personoj, kiuj deziris ankaŭ aĉeti saman aparaton kaj jam tuj deziris eklerni la maŝinlingvon. La korespondisto sendis al japana komerca agento leteron kun la peto, ĉu li povas liveri la aparaton. Kvar kolegoj jam anticipis komencis lerni la lingvon. En la reproduktaĵo de la oficejo sinjoro Hakma kopiis la lernolibron. Dekfoje...dudekfoje...ankoraŭ dudekfoje. Neniam li havis sufiĉe da kopioj. Li nepre ne bedaŭris la monon elspezitan por la aparato. En ĝi ja ankoraŭ kaŝiĝas tre grava eblo. Oni povas ŝalti specialan mikrofonon, adaptitaj je sonoj ne aŭdeblaj por la homa orelo. Baldaŭ en televidaj programoj ĉiuj paroloj estos akompanataj de

maŝinlingva parolo. Aŭdebla ne por la homa orelo, sed nepre por la aparato, kiu tradukas la tekston en la deziritan lingvon. Tiel per la satelitaj sendiloj oni povos spekti kaj kompreni ĉinajn, usonajn, japanajn, arabajn kaj multajn aliajn programojn.

Sendube ankaŭ en radiostacioj kaj kinejoj la aparato trovos vastan aplikadon. Sinjoro Hakma pripensis, ke tio estas tute alia afero ol tiu de Aspirinto, la mucida lingvo de la bofrato. La maŝinlingvo en du jaroj multfoje pli progresos ol Aspirinto progresis dum pluraj jardekoj. Sinjoro Hakma de tempo al tempo diskutis kun sia bofrato, kiu la lastan fojon asertis, ke Aspirinto nun baldaŭ fariĝos ĝenerala en la scienca mondo. Oni ja miksis kelkajn grekajn literojn en la alfabeton de la lingvo, por ke ĝi komplete science aspektu.

Ĉi tiuj asertoj igis sinjoron Hakma ironie rideti kaj plifortigis ankoraŭ lian psikologian reziston kontraŭ Aspirinto. Intuicie li ĉiam rigardis la aferon aspirintistan kiel ion nebonan, ion kontraŭ-naturan. Nun la faktoj rilate la lingvomaŝinon nekontesteble pravigis lian intuicion!

Pasis kelkaj semajnoj kaj sinjoro Hakma fariĝis tre lerta lingvomaŝinisto. El Japanio venis respondo al la letero de la korespondisto. La aparatoj ne tuj estis livereblaj. La fabrikoj ne povis sekvi la grandegan postuladon. Kliento kalkulu pri atendo de minimume kvar monatoj inter mendo kaj liverado.

Okazis intertempe, ke la edzino de sinjoro Hakma gajnis premion. Ŝi studis la francan lingvon kaj per verkaĵo ŝi gajnis en konkurso dektagan restadon en Parizo. Tio estis organizita de la franca ambasado. La franca registaro sciis fari siajn lingvon kaj landon allogaj por nederlandanoj. En Parizo kaj ĉirkaŭaĵo la geedzoj Hakma multe ĝuis la specialaĵojn de la urbo. Kvankam la ekskursiva programo estis ampleksa, tamen restis horoj, eĉ tuta tago, por memstare promeni kaj amuziĝi. Tiam sinjoro Hakma agis per sia maŝino.

Kiam sinjoro Hakma revenis en la oficejon post

la restado en Parizo, li aspektis malgaje.

„Ĉu via restado tie estis plezura?“ demandis la kolegoj, „Kaj kie estas via lingvomaŝino?“

„Hejme,“ malgaje respondis sinjoro Hakma.

„Ĉu la aparato difektiĝis?“ plue demandis la kolegoj, „Ĉu vi tie trovis eblon ĝin praktiki?“

„Ĉesu pri tiu aparato,“ ĝemante diris sinjoro Hakma, „Jes, mi ĝin uzis. Mi renkontis francon kun sama aparato. Lia edzino kaj la mia interparolis france. Mi maŝinlingve flustris en mian aparaton dum la franco aŭskultis la francan tradukaĵon. Li ankaŭ maŝinlingve flustris en sian aparaton kaj mi aŭskultis la nederlandan tradukaĵon. Tiel ni multfoje interparolis. Denove ĉirkaŭstarantoj tuj interesiĝis pri niaj aparatoj. Ankaŭ tie vivis la deziro aĉeti tian aparaton kaj lerni la maŝinlingvon. Tamen la antaŭlastan vesperon de nia restado la baterio en la aparato de la franco elĉerpiĝis. Tiam montriĝis, ke ni tute ne bezonas porti la dukilogramajn aparatojn. Rekte ni povis paroli unu kun la alia per la maŝinlingvo. Kiel ridis la edzinoj! Kaj plej terure estas, ke poste iu maljunulo sin miksis en nian maŝinlingvan konversacion kaj rakontis al ni, ke ĉi tiun lingvon li jam lernis antaŭ kvardek jaroj.“

Kun riproĉa rigardo al la korespondisto-lingvisto finis sinjoro Hakma sian parolon: „La maŝinlingvo... ho... ĝi estas esence la sama kiel la lingvo de mia bofrato. Cetere ĝin inventis ne sveda inĝeniero, sed iniciatis ĝin pola okulkuracisto.“



sendis s-ino A. Oosterwijk-Dominicus

SILABO- ENIGMO

El la sekvantaj silaboj vi formu 12 vortojn.

Ties unuaj kaj lastaj literoj, legitaj de supre malsupren, konsistigas la komencon de Esperanta kanto.

La finaĵoj 'o' de la solvoj de 3, 4, 6, 8 kaj 11 ne valoras.

Ekz-e se la vorto estus *abomeno*, temas pri A kaj N.

A – DOR – ES – EN – ĜI – JO – LA – LUK – MA – NE – NO – NUN – O –
OF – PE – RE – RO – SO – SO – TE – TO – TRA – Ŭ – VEN - VO

1. prepozicio
2. agado en la akvo
3. elspezoj malnecesaj
4. loko por konkuro
5. monato
6. malgranda, ronda nutraĵo
7. eco de la lingvo Esperanto
8. malantaŭaĵo
9. multfoje okazanta
10. tempa esprimo
11. natura forto
12. nekonata al pesimisto



fonto: nekonata



solvo:

1. en 2.naĝi 3.lukso 4.arenso 5.monato 6.ovo
7.neŭtrala 8.dorso 9.ofto 10.nun 11.vento
12.espero - en la mondon venis nova sento

Esperanto-klubo GRONINGEN-DRENTE
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - *taal zonder grenzen*